

Babilada rondo

... okazas je la 19-a.
Aliĝu rekte ĉe la
gastiganto mem.



Vendrede, la 28-an de okt
... ĉe Charlotte Blanc Maillard
Av. Nestlé 9 - 1800 Vevey
079 393 32 63

* * * * *

Vendrede la 18-an de nov.
...ĉe Francisko
Vendrede la 2-an de dec.
... ĉe Sonia

Estas la lasta ... ĉijare.

Propagando

en la bazar:

... inter la 9-a kaj la 12-a

Venu multnonbraj
sabate, la 22-an de
oktobro
en Laŭzano



AGENDU

28-an de aprilo 2012
Ĝenerala Kunveno
de SES
en Vevey

Laŭzana Esperanto - Societo

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22
+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 647 29 28
esperanto@citycable.ch * www.esperanto.ch/Lausanne
Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Bühlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte
Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: Francisko Randin *
076 411 14 55 - Kasisto.: Sonia Daubercies * 077 494 99 39

Laŭzana Esperanto - Societo

Informilo

Novembro 2011 - n° 09

Lunde la 7-an de novembro 2011,
je la 20-a, ĉe la unua etaĝo
de la laŭzana stacidoma bufedo
Venu spekti DANNIR-ajn filmojn
realigitajn kun André Cherpillod
pri tre diversaj temoj.

Sabate la 17-an de decembro
Zamenhofa Festo

* * * **2012** * * *

Lunde la 9-an de januaro:

Decidota

Lunde la 6-an de februaro

Ĝenerala Asembleo

Lunde la 5-an de marto

Decidota

Lunde la 2-an de aprilo

Decidota

Lunde la 7-an de majo

Decidota

La novaj vestoj de la imperiestro

(Marjorie Boulton laŭ Anderson)

Antaŭ multe da jaroj vivis imperiestro, kiu tiel treege ŝatis belajn novajn vestojn, ke li elspezis sian tutan monon por esti ĉiam bele ornamita. Li ne zorgis pri siaj soldatoj, ne ŝatis komedion kaj nek veturis en arbaro, krom nur se tio donis al li okazon montri siajn novajn vestojn. Li havis robon por ĉiu horo de la tago, kaj kiel ordinare oni diras pri ĉiu alia reĝo, ke li estas en la konsilistaro, tiel oni ĉiam diris ĉi tie: "La imperiestro estas en la vestoŝranko!"

En la granda urbo, kie li loĝis, la vivo estis tre gaja, ĉiutage venis multaj fremduloj. Iun tagon venis du fraŭdistoj; ili ŝajnis sin teksistoj kaj diris, ke ili kapablas teksti la plej ravan ŝtofon, kiun oni povas imagi al si. Ne nur la koloroj kaj la desegno estis io eksterordinare bela, sed la vestoj, kiujn oni kudris el la ŝtofo, havis tiun mirindan econ, ke ili fariĝas nevideblaj por ĉiu homo, kiu ne taŭgas por sia ofico, aŭ kiu estas nepermeseble stulta.

"Tio estus ja bonegaj vestoj," pensis la imperiestro; "portante ilin, mi povus ekscii, kiuj viroj en mia regno ne taŭgas por tiu ofico, kiun ili havas; mi povus distingi la saĝajn de la stultaj! Jes, tiun ŝtofon oni tuj devas teksti por mi!" Kaj li donis al la du fraŭdistoj grandan antaŭpagon, por ke ili komencu sian laboron.

Ili ankaŭ starigis du teksilojn kaj ŝajnigis, kvazaŭ ili laborus, sed ili havis tute nenion en la teksilo. Senĝene ili postulis la plej delikatan silkon kaj la plej bonan oron; sed tion ili metis en sian propran sakon kaj laboris per la malplenaj teksiloj, kaj eĉ ĝis malfrue en la nokto."

Nun mi tre ŝatus scii, kiom ili atingis pri la ŝtofo!" pensis la imperiestro, sed li havis iom strangan senton ĉe la koro pro la penso, ke tiu, kiu estas stulta aŭ malbone taŭgas por sia ofico, ne povas vidi ĝin; nu, li ja kredis certe, ke li ne bezonas timi pro si mem, sed tamen li volis unue sendi alian personon por rigardi, kiel

statas la afero. Ĉiuj homoj en la tuta urbo sciis, kiun mirindan forton havas la ŝtofo, kaj ĉiuj estis avidaj por vidi, kiel maltaŭga aŭ stulta estas lia najbaro.

"Mi sendos al la teksisto mian maljunan, honestan ministron!" pensis la imperiestro, "li povas plej bone vidi, kiel aspektas la ŝtofo, ĉar li havas kapablon, kaj neniu prizorgas sian oficon pli bone ol li!"

Nun la maljuna, bonkora ministro eniris en la salonon, kie la du fraŭdistoj sidis laborantaj per la malplenaj teksiloj. "Dio gardu nin!" pensis la maljuna ministro kaj malfermegis la okulojn, "mi ja povas nenion vidi!" Sed tion li ne diris.

Ambaŭ fraŭdistoj petis lin bonvole proksimiĝi kaj demandis, ĉu ne estas bela desegno kaj ravaj koloroj. Tiam ili montris al la malplena teksilo, kaj la kompatinda maljuna ministro daŭre malfermegis la okulojn, sed li povis nenion vidi, ĉar nenio estis. "Sinjoro Dio!" li pensis, "Ĉu eble mi estas stulta? Tion mi neniam kredis, kaj tion neniu homo rajtas scii! Ĉu eble mi ne taŭgas por mia ofico? Ne, mi ne povas riski rakonti, ke mi ne povas vidi la ŝtofon!"

"Nu, vi nenion diras pri ĝi!" diris unu el la teksantoj. "Oo, ĝi estas bela! nepre plej dolĉa!" diris la maljuna ministro kaj rigardis tra siaj okulvitroj, "tiu desegno kaj tiuj koloroj! Jes, mi diros al la imperiestro, ke ĝi treege plaĉas al mi!"

"Nu, tio ĝojigas nin!" diris ambaŭ teksistoj, kaj nun ili nomis la kolorojn kaj la kuriozan desegnon. La maljuna ministro atente aŭskultis, por ke li povu diri la samon, kiam li venos hejmen al la imperiestro, kaj tion li faris.

Nun la fraŭdistoj postulis pli da mono, pli da silko kaj oro, tion ili devis uzi por teksado. Ili metis ĉion en siajn proprajn poŝojn, en la teksilon venis eĉ ne unu fadeno, sed kiel antaŭe ili pluteksis per la malplena teksilo.

Baldaŭ la imperiestro denove sendis alian bonkoran oficiston por vidi, kiel statas la teksado, kaj ĉu la ŝtofo baldaŭ estos preta.

(daŭrigota)